



EKO 2016-14 sendita el Rotterdam, la 26an de aprilo.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

## Junuloj maturiĝas por mem gvidi trejnkursojn



Jen foto de la partoprenintoj en la 22a Seminario pri Aktivula Maturigo kadre de la Internacia Junulara Festivalo. Tiu seminario okazis simbioze kun aranĝo de TEJO kadre de programo de Eŭropa Junulara Trejnado (ETEY) kun celo trejni grupon de estontaj trejnistoj. Tiu programo havos sian sekvon en la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Wrocław tuj antaŭ la UK en Nitro. Tie la 17 homoj el Pesaro kompletigos sian trejnadon, kaj en la lastaj du tagoj tuj praktikos siajn lernaĵojn gvidante aron da sesioj por deziremaj kongresanoj. Tiu aranĝo same portos AMO-numeron.

## ***Fragmentoj el la ĵusa kunsido de la Estraro de UEA***

La Estraro de UEA kunsidis dum tri tagoj (23-25 apr.) en la Centra Oficejo en Roterdamo. Temas pri la unua kunsido gastigita de la nova Ĝenerala Direktoro, Veronika Poór, kaj la lasta kunsido de la nuna Estraro, kies mandato finiĝos post tri monatoj ĉe la UK en Nitro. Unu estrarano, Stefano Keller, iom antaŭtempe forfalis de la teamo, ĉar li sendis demisian leteron en la tago antaŭ la kunsido. La letero tamen ne multe klarigis pri la kialoj de tiu decido.

Jen sekvapaĝe resumo pri tre selektitaj partoj de la ampleksa diskutado en la estrara kunsido. Sekvos informoj pri pliaj partoj de la kunsidado.

## Kunordigo: modernigo plurflanka

La ampleksa tagordo fokusiĝis al preparoj por kelkaj gravaj evoluoj, inkluzive de nova Strategia Plano proponota al la Komitato en Nitro. Modernigo de la Statuto eknecesas, ne nur pro la plenata jura memstariĝo de TEJO sed ankaŭ por faciligi la partoprenon de la membroj en elektoj, por enkonduki la senpagan aliĝkategorion Amikoj de Esperanto, kaj por kelkaj aliaj adaptoj al la nuntempo. Plisimpligo de la kotizsistemo, kun baza kategorio de “simplaj membroj” kiuj ricevas servojn nur rete, estis plia grava temo. Pri ĉiuj ĉi evoluoj la Estraro profunde diskutis kaj faris aron de decidoj, kiuj speguliĝos en konkretaj skribaj proponoj al la Komitato. Oni antaŭvidas ardaĵn diskutojn por la komitatkunsidoj en Nitro.

## Komunumo: al la Zamenhof-Jaro

Ekformiĝis la unuaj planoj por agadoj ligitaj kun la venontjara centjariĝo de la forpaso de Zamenhof. La Jaro donos okazon reatentigi pri la valoro de la idearo kaj verkaro de Zamenhof por la nuntempa mondo. Amasiĝas ideoj: ekzemple, ke la 14an de aprilo 2017 disvolviĝu tutgloba seria legado el la verkoj de Zamenhof, transdonata ĉiuhore de tempo al tempo. En la tempo ĝis Nitro la Estraro sondos ĉe Landaj Asocioj pri iliaj planoj, kreas gvidilon kun sugestoj por agado, ekserĉos tradukantojn por diverslingvaj versioj de la plej aktuala biografio de Zamenhof, kaj iniciatos la kompiladon de memorlibro.




## Kapabligo: Fokuso al la Lernantoj

La prezidantino de ILEI, Mirejo Grosjean partoprenis skajpe la plimulton de la diskutoj. Grava temo estis la Jaro de la Lernanto, kiun UEA kaj ILEI kune festos, kun malfermo en Nitra kaj fermo en Seulo. Planata por la jaro estos aktualigo kaj reeldono en reta formo de la Manlibro pri Instruado. Plia plano estas konkurso por filmetoj kiuj emfazas interkulturon. Ene de la jaro aperos la 150a numero de *Juna amiko*. La organo *Internacia Pedagogia Revuo* pretigos apartan numeron prepare al la 50a Konferenco de ILEI en 2017. Diskutite estis la iniciatoj de <edukado.net> por starigi ligojn kun kursfinintoj el Duolingo kaj por lertigo de geonkloj (mentoroj). La Jaro estos malfermita en la Tago de Lernado en Nitro, kun daŭrigo en la tujposta Konferenco de ILEI en Hungario. Detalado de la programo okazos post deko tagoj en la estrarkunsido de ILEI. Esperate estas intensigo de kontaktoj inter universitatoj kun kursoj pri interlingvistiko.

## Komunumo: landoj kaj regionoj

Diskutite la apoga rolo de UEA arigi E-parolantojn en elektitaj regionoj, ekzemple per aranĝo de eventoj al kiu eblas inviti homojn, interalie rete. Revenas la ideo por subteno de vojaĝantaj informistoj kaj kursgvidantoj. Indas enplekti forumojn de junularaj organizoj kiuj disponas je utilaj kontaktoj kaj subteno por trejnkursoj kaj ĉe organizaj demandoj.



Teksto: Mark Fettes kaj Stefan MacGill



La estraro, ĝenerala direktoro kaj la nova redaktoro de revuo Esperanto en la kutima fotoloko.

Fotoj: SMG

## ***Invito al La 40a Internacia Esperanto-Sumoo***

**Tio okazos inter la 8a kaj la 22a de majo 2016.** Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj. En la januara sumoo partoprenis 277 homoj el 29 landoj kaj ili entute legis 20000 paĝojn.

**Informoj:** [https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Esperanto-Sumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)

**1. Kiel vi partoprenos:** Elektu libron, kiun vi legos dum tiu konkurso. Decidu kiom da paĝoj vi legos ene de unu tago. Se vi legas pli ol la promesitajn paĝojn, vi akiros venkon en tiu tago, se ne, malvenkon. Tiel vi luktas kun tra 15 tagoj. Vi luktas ne kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ vi mem.

**2. Aliĝo:** HORI Jasuo, JP-371-0825, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3: [hori-zonto@water.sannet.ne.jp](mailto:hori-zonto@water.sannet.ne.jp)

1) Kun via nomo, sekso, lando, urbo, retadreso, via luktista nomo.

2) Kun titolo de la libro, kiun vi legos, kaj kvanto da paĝoj, kiujn vi legos por unu tago.

## ***Redaktora adreso por revuo Esperanto***

[redakcio@revuoesperanto.org](mailto:redakcio@revuoesperanto.org)

Mesaĝoj, kiujn vi sendas al tiu adreso atingas la labortablon de la nova redaktoro, s-ro Attila Kaszás. Precipe en ĉiu transira periodo bonvenas artikoloj, precipe ideoriĉaj kaj antaŭenrigardaj kaj prefere kun bonkvalitaj agomontraj bildoj.

Vortoj: 920

Por tuja uzo kaj plia diskonigo.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikadojn iru al: [www.uea.org/vikio/Komunikado\\_kun\\_LA\\_FA...](http://www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA_FA...)